



Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 3 1968

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Ĉefredaktoro: Johan Hammond Rosbach

3-a periodo
34-a (39-a) jaro
Monata

U.E.A. 60-jara

Jam frue la esperantistoj komencis diskuti pri fondo de organizaĵo de la esperantistoj en la mondo, sed nur en 1908 la ideo realiĝis, kiam laŭ iniciato de la svisa pioniro Hector Hodler fondiĝis Universala Esperanto-Asocio.

Komence U.E.A. konsistis nur el individuaj membroj, sed post longjaraj diskutadoj oni fine transformis ĝin en la nunan sistemon. U.E.A. konsistas hodiaŭ el aliĝintaj landaj asocioj esperantistaj kaj individuaj membroj en landoj, kie ankoraŭ ne troviĝas aliĝinta landa asocio. Tiamaniere la granda plimulto de la organizitaj esperantistoj en la mondo apartenas nun al U.E.A., sub la moto «Unueco estas Forto». Ankaŭ la plimulto de la fakaj asocioj estas hodiaŭ aliĝintaj aŭ kunlaborantaj asocioj de U.E.A.

Por la ordinaraĵaj membroj la senkompare plej grava arango de U.E.A. estas la sistemo de Delegitoj. Al Delegito vi povas skribi pri ĉiaj informoj k.t.p., kiujn vi bezonas el eksterlando, kaj al Delegito vi povas turni vin dum vojaĝo en fremda lando. En multaj landoj certe pli multaj homoj parolas angle ol Esperante, sed kiel trovi la angle parolantojn? Esperante parolantojn vi povas ĉiam trovi, per Delegitoj. Guste tial Esperanto estas jam pli utila dum eksterlanda vojaĝo ol la angla, franca kaj germana lingvoj kune. Tio ne estas propagando aŭ fanfarono, sed simpla vero.

Sed kiel trovi la Delegitojn? La nomoj kaj adresoj de la miloj da Delegitoj troviĝas en la Jarlibro de U.E.A.. La kotizo, kiun la landa asocio pagas al U.E.A. por ĉiu el

siaj membroj, estas tute malgranda, kaj ne sufiĉas por pagi la gravegan Jarlibron. Sed se oni fariĝas Membro—Jarlibro de U.E.A., per aldona kotizo de kr. 25, oni ricevas la Jarlibron.

Same kiel la landaj asocioj prizorgas la grandajn taskojn tutlandajn, kiujn lokaj kluboj ne povas plenumi, ankaŭ U.E.A. laboras pri la eĉ pli grandaj taskoj tutmondaj, kiujn landaj asocioj ne povas plenumi. U.E.A. efektive laboras pri multaj tiaj gravaj taskoj, mi ne povas ĉi tie mencii ĉiujn, sed atentigas aparte pri la gravega tasko prilaboradi la grandajn internaciajn organizaĵojn U.N.O., UNESCO k.a. por penetrigi Esperanton tie. Alia grava aktiveco de U.E.A. estas la aranĝado de la Universalaj Esperanto-Kongresoj, kiujn vi ja ĉiuj rajtas partopreni, kaj kiuj ebligas al la esperantistoj facile viziti la plej diversajn landojn de nia interresa terĝlobo. Pri ĉio, kio okazas en Esperantujo, informas la gazeto de U.E.A., la revuo ESPERANTO. Se vi pagas aldonan kotizon de kr. 50, vi ricevas kaj la Jarlibron kaj la revuon.

Okaze de naskiĝtago oni ordinare donas al la jubileanto donacon. La plej bela donaco, kiun vi povas doni al U.E.A. okaze de ĝia jubileo, estas anonci vin kiel Membro-Jarlibron aŭ kiel Membro-Abonanton. Sendu la sumon al la Ĉefdelegito de U.E.A., s.ro Alfred Skybetrĝ, Østensjøvn. 118a, Oslo 6, poŝtĝirokonto 133.29.

Amasa reago al ĉi tiu admono estu nia gratulo al U.E.A. okaze de ĝia 60-jara jubileo.

C. Stop-Bowitz.



Mi opinias . . . Pensoj de la legantoj

Pri paperkanonoj kaj iom pli

IOE-Gazeto, kiun mi vidas de tempo al tempo, prezentas en ĉiu numero liston da adresoj, kiujn oni bombardu per paperkanonoj. Bonega ideo. Ankaŭ Norvega Esperantisto iam reprenis tiun liston el la menciita gazeto.

La verda armeo marŝas! La verda armeo atakas. El ĉiuj partoj de la mondo alvenas leteroj al tiuj adresoj. La ricevantoj estas preskaŭ ŝokitaj de la amasoj: ĉu vere la esperantistoj estas tiel multaj? Ĉu ili tiom interesiĝas pri turismo?

Mi faris al mi la demandon: kiom el ni, norvegaj esperantistoj, reagis al tiu instigo? Ĉar mi ne sendis eĉ unu leteron! Ĉu vi skribis?

Ĉu ne?

Ĉu vi ne apartenas al la verda armeo?

Vi ja estas tiel fieraj pri la esperantistoj kaj pri la mondampleksa laboro, kiun ili faras!

KURSO EN NORVEGA GAZETO

En la Norvega Esperantisto ni povis legi pasintaŭtune pri Esperanto-kurso en ĵurnalo en unu el niaj urboj. La redakcio de nia gazeto insiste petis — mi citas: «Estas tre grave, ke la norvegaj esperantistoj nun skribu al la redakcio, menciante, ke ili informiĝis pri la kurso.» Kaj: «Se vi konas la redaktoron de iu ofseta taggazeto, montru al li la kurson, kaj proponu, ke ĝi faru similan kurson. Se vi ne mem kapablas verki tian kurson, petu, ke la redaktoro kontaktigu kun Norvega Esperantista Ligo.»

En la posta numero de Norvega Esperantisto ni povis legi la malĝojigan informon, ke unu *persono* reagis. Unu *persono*!

Kie estas la verda armeo?

Ĉu ni rajtas esti fieraj?

Estas skandalo!

Mi ja ne estis tiu unu *persono*. Mi nun skribis al la verkanto de la koncerna gazeto kurso, demandante, kiom da *personoj nun* skribis leteron al la ĵurnalo.

Ĉu vi povas diveni? Tri *personoj*!

Mi ne estis inter ili.

Mi hontas.

NE LEGU ĈI TION!

Mi nun skribis al la koncerna taggazeto, mi aĉetis ekzemplerojn.

Ĉu vi scias, ke tiu kurso ĉiufoje kovras kvaronan paĝon? Ĉu vi atentis, ke tio efektive estas *anonco por Esperanto* — *senpaga anonco*? Kio do pagis ĝin?

Pagis ĝin la *persono*, kiu per sia laboro persvadis la redaktoron, kaj kiu nun per sia laboro verkas tiun kurson. Li pagas per sia laboro.

Kaj kiam oni petas, ke ni subtenu lian laboron, ni restas pasivaj. Ĉu vi pafis per via kanoneto? Kial ne? Ĉu vi eble ne deziras, ke Esperanto progresu? Aŭ ĉu tiu kostus al vi tro multe — skribi tiun leteron, tiujn malmultajn liniojn, kaj aĉeti tiun poŝtmarkon?

Ĉu vi ofte havas eblecon fari ion aktive por Esperanto? Vi nun havis okazon!

Ĉu vi konas redaktoron de ofseta gazeto? Se jes, ĉu vi montris al li tiun kurson? En kiom da ofsetaj gazetoj aperas nun Esperanta kurso?

Efektive en du! Kiu proponis ĝin al la alia? Ĉu iu esperantisto en la urbo de la alia gazeto? Ne, la verkanto de la kurso devis mem fari tion.

Ĉu vi trovas strange, ke Esperanto ne rapide progresas?

ESPERANTA LITERATURO AL UB

Ĉu vi legis, en n-ro 8 de 1967, artikolon de universitata bibliotekisto Høeg? Li havis sukceson en sia laborejo: la Universitata Biblioteko bonvolas akcepti maŝinskribitajn manuskriptojn! La kolekto konsistas ĝis nun nur el la propraj manuskriptoj de Høeg. Bona komenco. Nun mi demandas min: Kiom el vi sendis manuskripton? Mi ne faris. Ĉu vi? Aŭ ĉu sinjoro Høeg devas sola pleniĝi ĉiujn volumojn? Mi ŝatus ricevi de li, en Norvega Esperantisto, liston pri la manuskriptoj, kiuj alfluis post la apero de lia artikolo. Se alvenis pli ol unu, mi kredos, ke ni povas esperi pri progreso de Esperan-

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20-a en la monato
antaŭ la apero.)

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 8,00

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,00
1/2 p. kr. 75,00, 1/4 p. kr. 38,00,
1/8 p. kr. 19,00.

Kampanjo por fortikigo de UEA

1968 estas la Jaro de la Homaj Rajtoj kaj UEA efektivas ampleksan agadon por la Internacia Lingvo kiel la plej efika rimedo por kontraŭbatali lingvan diskriminacion.

1968 estas ankaŭ la jaro de la 60-a datreveno de la fondiĝo de Universala Esperanto-Asocio kaj la Estraro lanĉis kampanjon por konsiderinda altigo de la nombro de individuaj membroj.

La celo estas 10 000 individuaj membroj de UEA en la Jubilea Jaro 1968. Ĉu vi ne volas helpi, ke UEA sukcese realigu ambaŭ celojn?

Aliĝu tuj al UEA, membrigu viajn geamikojn kaj la kursfinintojn. Kontribuu al «Fondaĵo Canuto», el kiu UEA pagas la kotizojn por sindonaj laborantoj por la Internacia Lingvo en landoj, el kiuj oni ne povas pagi kotizojn al UEA.

KOTIZOJ DE UEA EN NORVEGUJO

En Norvegujo la Kotizoj estas: Membro kun Jarlibro 25,—, Membro-Abonanto 50,0, Membro-Subtenanto 75,—, Juna Membro kun Jarlibro 12,50, Juna Membro-Abonanto 37,50, La Kotizojn oni pagas al la Ĉefdelegito de UEA, s-ro Alfred Skyberg, Østenv. 118 a, Oslo 6. Pĉk. 133.29.

to ankaŭ en nia lando. Se ne, — — —
Ĉu paperkanonoj vere estas efikaj?

Hontemulo.

*

Kvankam iomete tro longan ni publikigas ĉi tiun artikolon, ĉar ĝi estas *la amara vero*. Legu en n-ro 1/1968, pĝ. 3 la artikolon «Invito». Ni invitis niajn legantojn verki por nia gazeto.

Kiel reago al tiu invito tuj venis tri kontribuoj — ĉiuj el Oslo. Poste nenio.

Red.

NORDA PRISMO

La konata verkisto William Auld, Skotlando, estas nova ĉefredaktoro de «Norda Prismo». Auld estis redaktoro de «Esperanto» kaj de «Monda Kulturo». Li redaktis ankaŭ la poezian parton de la Angla Antologio kaj la Esperantan Antologion, Poemoj 1887 — 1957. Li estas unu el la «Kvaropo», la volumo, kiu komencis la serion STAFETO, al kiu li kontribuis ankaŭ per «La Infana Raso», poemo en 25 ĉapitroj. Li estas membro de la Akademio de Esperanto.

LA JARRAPORTO DE N.E.L. PRI 1967 devis aperi en ĉi tiu numero, sed ĉar 5 el la plej gravaj sekcioj ĝis la fino de Februaro (unu monaton post la limdato) ankoraŭ ne liveris siajn raportojn, kiuj formas bazon de gravaj punktoj de la jarraporto, mi ne povis pretigi ĝin. Mi pretigos ĝin kiam tiuj sekcioj finfine estos liverintaj siajn raportojn.

La prezidanto.

JUBILEA KONGRESS DE CDEL

La 4-an kaj 5-an de majo 1968 okazos en KØGE (Selando) la 60-jara JUBILEA KONGRESO de CDEL. —

Definitiva programa ankoraŭ ne estas preta. Vic-prezidanto de UEA, s-ro Erik Carlén, Svedujo, estos nia gasto kaj s-ro Carlén prelegos pri la temo: «Interna Ideo — sentimentala balasto aŭ necesa ilo por venki.»

Ĉiuj informoj pri la kongreso estas haveblaj ĉe.

L. E. Kromann Jensen
Gymnasievej 117,3, KØGE
Danlando.

SCIIGOJ DE N.E.L.

Taskotabelo por la kluboj. — Aprilo:
Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas al N.E.L. kaj al la distrikto kotizojn kaj liston pri la malfruigintaj kaj eventualaj novaj membroj.

La Estraro.

UK en HELSINKI

La 54-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Helsinko la 26. julio—2. aŭgusto 1969. Verŝajne okazos antaŭkongresa seminario en Svedujo kaj postkongresa ekskurso al Leningrado.

Seminario sub aŭspicioj de U.E.A.

Esperantista kulturdomo

Internaciaj Kulturaj kaj Turismaj ferioj

Temo: Modernaj formoj de laboro en la nuntempa Esperanto-Movado.

En la formo de Libera Tribuno, estos pri-traktataj jenaj temoj:

22-an de Julio: Prof. D-ro Ivo LAPENNA
La socia Pozicio de Nuntempa Esperanto-Movado.

23-an de Julio: Jean THIERRY
La agado sur Kampo kultura

24-an de Julio: Tibor SEKELJ
La agado sur Kampo praktika

25-an de Julio: Hans BAKKER (aŭ iu alia reprezentanto de TEJO Kunlaboro kun aliaj internaciaj sociaj organizaĵoj)

26-an de Julio: Günther BECKER
Spertoj en Informado kaj Komunikado.

27-an de Julio: D-ro Peter ZLATNAR
Bazaj Principoj por sukcesa Organizita laboro

ĉiutaga tagordo:

Je la 8.30 horo: matenmanĝo

Je la 9.30 horo: enkonduka prelego

Je la 10.30 horo: Diskutado laŭ la programo

Je la 12.30 horo: tagmanĝo

Je la 16-a horo: Daŭrigo de la diskutado

Je la 19.30 horo: Vespermanĝo

Je la 21-a horo: «Nokta Universitato»
— Diskuto laŭ liberaĵoj temoj ĉirkaŭ la Ronda Tablo.

POST LA 27-an de Julio:

Prelegoj diverstemaj

Ekskursoj

Distraĵoj

Kiamaniere varbi novajn samideanojn?

ALIAJ METODOJ BEZONATAJ

Kiam oni respondos ĉi-supran demandon, estas necese esplori, kia speco de homo Esperantisto estas. Jes, multaj Esperantistoj apartenas al speciala homa tipo. Estas idealistoj kun sento por komuneco, frateco, kunlaboro trans landaj limoj kaj homaj barieroj. Kie oni trovas tiajn homojn? Ekzemple en unuigoj, asocioj kaj societoj kiel Unu Mondo, La Eŭropa Movado, Morala Rearmado, La U.N.-Asocio k.t.p.

Precize kiel en la komerca vivo, estas necese fari «merkatan esploron». Tiun merkaton devas ni prilabori.

Kiel? Ni projektu kaj efektivigu reklaman kampanjon por tiuj grupoj. En la gazetoj de tiuj asocioj ni klopodu publikigi artikolojn pri Esperanto. Samtempe ni enprenigu anoncon pri nia movado.

N.E.L. kaj Esperantoforlaget A.s kune prezentu afablan leteron al ĉiuj kiuj skribas al ni. Ni ofertu:

Korespondan kurson, aŭ

Praktikan kurson,

Lernolibrojn por memstudo.

Pli oni devas ĉementi mallongan liston pri elektitaj libroj kaj gazetoj kun prezoj.

En tiu maniero oni povas influu tute novajn rondojn ekster la konataro de la Esperantistoj, kaj gajni novajn anojn por nia movado. Ĉu estas uzebla ideo? Sendube, sed kostas mono. Ĉu ekzistas propaganda fondaĵo? Jes, estas realeco. Ĉu ne fari eksperimenton?

Otto M-K. Pay.

Karl Ekhaugen 70-jara

La 25-an de Marto Karl Ekhaugen fariĝis 70-jara. Eble kelkaj malnovaj samideanoj pensas: Mirige, mi ja ne memoras lin el la fruaj jaroj de Esperanto en nia lando. Fakte ne mirige, ĉar li eklernis Esperanton antaŭ nur proks. 13 jaroj, post kiam lia filo jam esperantistiĝis. Estante laŭprofesie bankkasisto li tre baldaŭ elektiĝis kasisto de N.E.L., kaj daŭre restas en tiu gravega ofico, kiun li pli ol modele prizorgas. Li estas preskaŭ sorĉisto pri mono, ĉar spite al malvasta budĝeto kaj malfacila ekonomio li ĉiam sukcesas trovi monon, kiam la estraro ĝin bezonas!

Karl Ekhaugen ĵus emeritiĝis, kaj tiam ricevis la Reĝan meritmedalon pro 50-jara fidela servado al sia banko. En 1965 li ankaŭ fariĝis Kavaliro de Pro Merito pro sia same fidela servado al N.E.L.. Ni timis ke post 10-jara kasista laboro li retiriĝos. Ne, li diris, kiam mi emeritiĝos, mi havos ja pli da tempo, se vi min bezonas daŭre. Kaj ni lin certe bezonas. Li havas nur unu mankon: li estas tro modesta, sed multaj el vi certe konas lin el niaj landaj kunvenoj. Ni deziras al li feliĉon, sanon kaj forton dum tre multaj jaroj!

C. Stöp-Bowitz.

Hugo Steiner 90-jara

La fondinto kaj gvidanto de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, s-ro Hugo Steiner fariĝis 90-jara la 26-an de februaro. Li daŭre redaktas la «Informilon de IEMW». Por sia laboro li ricevis plurajn ordenojn kaj medalojn. Postfeste ni kore gratulas.

*

Al la junularo apartenas la estonteco. TEJO — la junulara sekcio de UEA — prizorgas la disvastigon de la lingvo en la medioj de gejunuloj ĉie en la mondo. Por helpi sian junularan sekcion UEA fiksis aparte favorajn kotizojn por gejunuloj.

ALIGU KIEL JUNA MEMBRO-AMBONANTO (JMA) AŬ KIEL MEMBRO-ABONANTO KUN «KONTAKTO» (MAK), LA LUKSA KVARONJARA REVUO POR GEJUNULOJ!

TEJO informas

TEJO estas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, la Junulara Sekcio de Universala Esperanto-Asocio.

TEJO EKELDONAS NOVAJBULTENON

Philadelphia — Ek de februaro 1968 TEJO eldonas dumonatan novaĵbultenon en Esperanto. La bulteno, kiu distribuiĝas al kunlaborantoj de TEJO kaj al la Esperanto-gazetaro, celas raportojn pri TEJO kaj ĝiaj sekcioj, pri Esperanto en la lernejoj, kaj pri junularaj evoluoj interesaj al siaj legantoj kaj al la legataro de la Esperanto-gazetaro. Redaktas ĝin la ĝenerala sekretario de TEJO, Humphrey Tonkin. La bulteno estas la kvara informilo regule produktata de TEJO: ĝi jam eldonas anglalingvan kaj franclingvan novaĵbultenojn, kaj internan informilon en Esperanto. Kvankam la bulteno estas esence tia, kaj ne estas esti belaspekta kvazaŭ gazeto, ĝin rajtas ricevi ankaŭ Patronaj Membroj 'A' de TEJO (por fariĝi Patrono de TEJO, turnu vin al Ulrich Lins, Gemarkenstr. 146, 5 Köln-Dellbrück, Germanujo).

DOBRZYNSKI NOMITA REDAKTORO DE «KONTAKTO»

Köln — Vicprezidanto de TEJO, Roman Dobrzynski, estas la nova redaktoro de la revuo Kontakto. Dobrzynski, kiu laŭ profesio estas ĵurnalisto, komencos sian redaktoperiodon per la daŭ numero de 1968. La informo, kiu sekvas dum januaro faritan decidon de la Estraro de TEJO, estas kelkrilate tre kuraĝiga. Dum la lasta jara, la revuo trairis malfacilan periodon unue pro administraj problemoj kaj due pro transiro al nova preĝisto, kaj okazis malfruigoj. Same turmentis la ĝisnunan redaktoron, Stefan Maul, problemoj pro manko de tempo. La administraj problemoj nun grandparte solviĝis, kaj la revuo denove regule eldoniĝas. Dobrzynski laboras kiel fakestro de la ilustrita revuo por studentoj «itd» en Varsovio. Li estas diplomito pri ĵurnalismo kaj magistro pri juro, eksprezidanto de Pola Esperanto-Junularo kaj eksredaktoro de «Pola Esperantisto». Li do alportos al sia deĵorperiodo, kiu sekvas la modelan laboron de alia profesia ĵurnalisto (Maul estas redaktoro de eklezia revuo), eksterordinaran sperton.

MEKSIKA JUNULARO KONGRESAS

Meksiko (EMJ) — La unua kongreso de la Esperanta Meksika Junularo okazis tie ĉi de la 14-a ĝis la 17-a de decembro. Inter la ĉeftemoj de la kongreso estis enkonduko de Esperanto en la Olimpikoj (la Ludoj okazos en Meksikurbo en 1968). La kongreso, ĉe kampadejo en la ĉefurbo, ankaŭ inkluzivis ekskurson, bankedon kaj 'Meksikan Nokton'.

HISPANA JUNULARO FESTAS NOVJARON

Tarragona (HEJS) — Hispana Esperantista Junulara Sekcio organizis Novjaran Feston en la Junulara Restadejo apud Ministrul de Montserrat. Dum tri tagoj kunvivis kaj amuziĝis 13-junaj geesperantistoj el kiuj unu estis el Norvegujo. La Restadejon oni oficiale inaŭguros okaze de la venonta TEJO-Kongreso en Tarragona.

KURSO KOMENCITA EN MALIO

Bamako — Komence de decembro 1967 en Bamako (Mali) s-ro Ibrahim Tambura prelegis publike pri la Esperanto-movado kaj faris demonstracion pri la lingvo. Sekvo de tio estis kurso por komencantoj, kiu kunvenas ĉiusemajne sub gvido de s-ro Tambura.

ARGENTINA JUNULARO KONGRESOS EN CORDOBA

Rosario — ArgentEJO anoncis ke ĝia dua Kongreso okazos 10–14 aprilo en la mezargentina urbo Cordoba, la tria plej granda urbo de la lando. Informoj ĉe: 2—A JAEK, Centro La Espero, Casilla 77, Rio Ceballos, Cordoba.

JUNA ESPERANTISTO REDAKTOS ZAMENHOF-LETEROJN

Nürnberg (GER) — TEJO-ano Reinhard Hauptenthal ricevis komision kolekti la ĝis nun nekolektitajn korespondadojn de Zamenhof, kaj redakti ilin en volumo eldonota de la eldonejo Stafeto. Malgraŭ tio, ke la originala verkaŭo de Zamenhof aperis en ampleksa volumo en 1929, kaj du volumoj da leteroj aperis sub redakto de Waringhien en 1948, Hauptenthal jam amasigis ĉ. 500 pliajn korespondadojn. Estas jam bone sciata, pro la biografio de Marjorie Boulton kaj el aliaj fontoj, ke Zamenhof plenumis mirige multan laboron dum sia vivo. Sed nun estas

klare evidente, laŭ Hauptenthal, ke la nombro da leteroj kiuj fluis de lia plumo «certe superas 10 000».

AŬGUSTA KONGRESO POR STELO

Aix-en-Provence — La studenta esperantistaro elektis tiun ĉi sudfrancan urbon por sia tria kongreso, kiu okazos post la internaciaj Esperanto-kongresoj en Hispanujo, nome de 13 ĝis 20 aŭgusto. La partoprenantoj loĝos en modernaj unupersonaj ĉambroj en la studenta hejmo de Aix, kaj kongresos en la Beletra Fakultato de la universitato. Antaŭviditaj en la programo estas ĝeneralaj konsidoj, beletraj prelegoj, diskutado pri la problemoj de studentaj rajtoj, pluraj ekskursoj, fakaj kunsidoj laŭ la studobjektoj de la partoprenantoj, ktp. Precipe ĉi-lastata programero estas valora aldono al la tradicia programo. Informojn pri tiu ĉi tria kongreso de STELO liveras: Studenta Esperantista Rondo, 28 rue Portalis, 13-Aix-en-Provence, Francujo.

PROGRAMO PASPORTO PROGRESAS

Rosario (Perspektivo) — Inter la flankaj ondoj de la starigo de la Programo de TEJO Pasporto estas starigo de 'Mini-Pasporto' por interŝanĝo de esperantistaj gejunuloj inter diversaj partoj de Brazilo, kie landa sekcio fondiĝis antaŭ nelonge. Laŭ informoj de la gvidanto de Programo Pasporto, Ruben Feldman, la Programo bone preparas sin por komenco de internacia interŝanĝado eble jam en 1968. La reago al novaĵoj pri la Programo en la Esperantogazetaro estis amasa kaj tre pozitiva. Cefa celo det Programo Pasporto estas aranĝi ĉeffamiliajn restadojn de alilandaj geesperantistoj dum difinitaj periodoj, cele al intensigo de internaciaj kompreno kaj kunlaboro. La elektitaj familoj estos kompreneble esperantistaj. Adreso de la Programo: Bv. Orono 866 'A', Rosario, Argentino.

DUA LERNOLIBRO DE AULD

San Carlos, Usono — Skota aŭtoro kaj instruisto William Auld ĵus kompletigis preparlaboron por sia dua lernolibro pri Esperanto. La unua aperis en 1965. La dua libro, *Paŝoj al plua posedo*, estas daŭrigo de la unua, *Esperanto, A New Approach*, kiu celis anglalingvanojn. La nova libro enhavas tridekon da lecionoj sur 200 paĝoj, en-

RECENZOJ

PENSOJ DE PASTRO

Hans Amund Rosbach:
Preparoj al diservo.
[Propra eldono. 1967.]
88 p. (nenumeritaj).
Formato A5 (14,8 x 21 cm).
Prezo: ne indikita.

«En la norvega eklezio ni uzas en ĉiu diserva krom la predika teksto ankaŭ alian evangelian tekston kaj aŭ epistolon aŭ tekston el la malnova testamento . . . Tiel ni havas tri seriojn da tekstoj por ĉiu diamano de la eklezia jaro. Kaj dum mia prepara laboro al la predikoj mi ĉiutage tralegas la predikan tekston, en la kvin unuaj labortagoj de la semajno ankaŭ unu el la aliaj kvin. El tiu legado naskiĝis la jenaj «Preparoj». Ili estas simplaj kaj homaj pensoj dum la legado.»

Tiujn ĉi vortojn de la aŭtoro mi citas por konigi la esencon de la recenzata libro. Tamen, li ne iras tra la tuta eklezia jaro, sed nur de adventa komenco ĝis paska fino, entute 22 semajnoj. Mi esperas, ke li en dua libro kompletigos la «preparojn» por la resto de la jaro.

La bibliaj tekstoj donas temojn de la

kondukon al la literaturo, kaj gramatikajn ekzercojn. Eldonos Heroldo de Esperanto, Bruselo.

GRANDA KULTURFESTIVALO PLANATA EN HUNGARIO

Budapest (HEJ) — Por fortigi la amikecon inter esperantistaj gejunuloj kaj ebligi la uzadon de la lingvo internacia en konkursoj, Hungara Esperanto-Junularo aranĝas Internacian Kulturfestivalon de 3 ĝis 7 aprilo en la apudnuba urbo Dunaujvaros. La programo enhavos konkursojn deklaman, oratoran kaj muzikan; okazos konkursoj pri verkado de prozo kaj lingva disertacio; kaj krome oni organizos balon kaj festivalon de Esperantaj ŝlagroj. Por eksterlandanoj HEJ aranĝos post la festivalo 3-tagan programon en Budapeŝto. (Hungara Esperanto-Junularo, Kenyermező u. 6, Budapeŝto VIII.)

pensoj dum la ses labortagoj de ĉiu semajno, sed por ĉiuj dimaĉoj kaj por aliaj specialaj tagoj la aŭtoro tradukis himnojn. Prave li aldonis simplajn muziknotojn por sciigi la melodion de ĉiu himno. En aldono li listigis la himnoverkintojn kun biografiaj notoj kaj kun originallingvaj titoloj de la himnoj. La plejmulto de la himnoj troviĝas en unu aŭ alia de la oficialaj himnaraj de la norvega eklezio. Tamen la verkintoj estas diversnaciaj.

Oni povas supozi, ke la tradukinto bazis sian laboron sur la originalaj tekstoj, ĉar en kelkaj okazoj la himnoj havas pli da strofoj ol en la norvegaj himnaraj (kaj, okaze, eĉ en alia vicordo). Aliflanke ankaŭ la kontraŭa okazo troviĝas: li ne ĉiam kunprenis ĉiujn strofojn de la originalo. La tradukoj ĝenerale bone redonas la originalojn, kvankam ofte nur laŭspirite — ne laŭvorte. En izolaj kazoj la versopiedoj stumblas, ekzemple en la bela himno de Bronson: «Rigardu, ĉe la Dia seg', jen aro blanka kiel neĝ'. Mia ritmosento kontuziĝas kontraŭ pluraj malglataĵoj en la unua kaj dua strofoj.

La libro estas ofsete presita laŭ bele tajpita originalo; menciinde, ke la linioj estas ĝustigitaj tiel, ke ili ankaŭ dekstramarĝene finiĝas egale. La preserojn — cetero ne ĝenajn — mi preteriras sen specifa mencio. Sed kelkaj lingvaj specialaĵoj meritas atenton.

La aŭtoro kelkloke uzas parte esperantigitajn vortojn: kvinagesimo (kvinkagesimo), sesagesimo (seksagesimo, tiel en la aldono pri aŭtoroj), Athanasio (Atanasio). Supozeble nur skriberaro estas septuaginto anstataŭ septuagesimo en la aldono. En vortaroj mi trovas la formojn Budao, Buddo, Budho, eĉ Budeo; la aŭtoro de «Preparoj» uzas Buddhao. Normigo ŝajnas necesa.

Mi rimarkis specialan uzon de la difina artikolo: «en la via vivo», «tiu la infan», «sur la Via venka voj», «knaboj du kaj ĉarma la edzin». Plurfoje mi trovis ŝajne nekorektan uzon de «al» (norvegismo?): «al fianĉin' li prenis min», «ni edukiĝis al bonaj kaj al fidelaj gefiloj», «igu nin al lumarme», «li farigis al ŝafido» (eble preseraro, anst. «la»); «al» anstataŭ akuzativo li uzas en «li ja atingas al la celo».

Iom fremdeca estas la uzo de «unu» en: «sed unu mi scias» (unu aferon, unu fakton), «nur unu ni ĉiam ŝuldas» (unu faron aŭ agon), «unu necesas», «nur unu Li ne

toleris». «Ali'» estas uzita kiel elemento de korelativoj: alies, alio. Sed por konsekvence uzi ali' tiel, oni devus skribi, ekzemple, «aliu homo» — ne «alia homo», kiel «tiu homo» — ne «tia homo», se oni ne parolas pri homo «de tiu kvalito».

Interesa estas la esprimo «Lin parolu laŭ la buŝo» — t. e. paroli laŭ lia plaĉo, pli-malpli false ŝajnigi saman opinion.

Fine mi devas mencii la vorton «viv-standardo» anstataŭ «vivnivelo» (ekonomia), kiu ja ne estas speco de flago.

Kvankam mi menciis preskaŭ nur malbonaĵojn de la lingvo, tio ne signifas, ke la lingvo ĝenerale estas malbona. Kontraŭe, la libron karakterizas korekta lingvo konciza, preskaŭ telegramstila, kiu sur malmultaj paĝoj esprimas multajn pensojn indajn je plua meditado de la leganto.

Nils Utne.

DU ĈINAJ ARTLIBROJ

Certe triumfos la popolo de Vjetnamio! Certe malvenkos la usonaj agresantoj! — Elektitaj verkoj kreitaj de ĉinaj artistoj. Fremdlingva eldonejo, Pekino 1966. 98 paĝoj.

Modernaj lignogravuraĵoj de Ĉinio. Eld.: Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1965. 90 paĝoj.

Laŭ la titolo, kaj ankoraŭ pli laŭ la kovrila bildo, oni tuj komprenas, ke la unua el ĉi tiuj artlibroj estas dediĉita al la milito. Efektive, ĝi enhavas verkojn faritajn subtene al la milito kontra «la usonaj agresantoj»: afiŝojn, bildseriojn, karikaturojn, lignogravuraĵojn, krokizojn kaj skulptaĵojn. La nomoj de la artistoj ne estas indikitaj. Tio ne signifas, ke la artistoj estas nuraj diletantoj, ĉar multaj el la prezentitaj artverkoj estas vera arto, el tre alta kvalito. Estas, tamen, domaĝe, ke la artistoj ne dediĉis sian arton al alia celo — per tio ni ne volas aserti, ke liberigo de sia lando ne estas sufiĉe digna temo, tute kontraŭe, sed pluraj el la artverkoj estas plenaj de malico kaj malamo — unu afiŝo eĉ titoliĝas «Ŝargi malamon en la kanonon!» — kaj tiuj ne estas temoj dignaj por inspiro.

La alia libro, kiel la unua en granda formato (22x 25 cm) estas tute serioza kolekto de arto. Mi ne konas eĉ unu el la artistoj (ĉu vi: Guofeng, Du Hongnian, Vu Kiangnian, Likjun kaj multaj aliaj), sed mi po-

vas certigi, ke oni kun granda plezuro trafolumas la libron, haltas ĉe kelkaj bildoj — kelkaj nigraj, kelkaj koloraj, dukoloraj aŭ plurkoloraj. La temoj estas diversaj: socialisma konstruado, popola vivo, pejzaĝoj, senviva naturo, la skoloj kaj stiloj estas malsamaj, sed ĉiuj bildoj havas ion por doni al la rigardanto. Oni komprenas, ke Ĉinujo posedas multajn grandajn artistojn, kaj oni devas nur esperi, ke la mondo iam denove fariĝos tiel pacplena, ke arto estos pli grava ol politiko. La Ĉina Esperanto-Ligo meritas grandan dankon por ĉi tiu belega albumo.

JHR.

TRAJTOJ DE LA HODIAŬA MONDO

La mondpercepto de la modernaj natursciencoj. 9 prelegoj. Komilito Herman Behrmann. Eld.: Ludwig Pickel, Nürberg, 1967. 170 p., broŝ.. Prezo: 32 steloj.

Ĉi tiu libro estas la 1-a volumo en serio «Esencaj trajtoj de la hodiaŭa mondo», kaj konsistas el naŭ prelegoj faritaj en la 10-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo. Inter la kontribuintoj ni trovas la nomojn de Ivo Lapenna kaj André Albault. La temoj estas tre diversaj: Rigardo en la Mikro- kaj Makrokosmon; Natursciencaj fundamentoj pri kosmonaŭtiko kaj pac-cela utiligo de.

satelitoj; Internaci-juraj problemoj de spacveturado; Elementaj korpuskloj kaj la strukturo de materio; Nunaj mondperceptoj per la biologio; Superpopolado, konsekvenco de kronika malsato; Pri la postsekvoj de la glacia epoko en Fenoskandio; Gubernatiko; Ranger fotas la Lunon. La libro ankaŭ enhavas la necesan bibliografion, tabelojn kaj fotojn, kaj eĉ fotojn kaj biografiojn de la prelegintoj.

Mi devas konfesi, ke mi ne tralegis ĉiujn prelegojn, sed ja legis multajn paĝojn de ĉi: kaj ĉio estas ege interesa — kiel ĝi devas esti, kiam fakuloj prezentas sian fakon. Nenio el la tuta libro apartenas al miaj fakoj, same kiel verŝajne neniu kapablas kovri ĉiujn ĉi fakojn: tio donas al mi la rajton de nefakulo kaj la okazon de nefakulo diri, ke mi tamen komprenas. Do, ĉi tiu libro estas tre utila, kaj por ĉiu, kiu interesiĝas pri temoj natursciencaj ĝi devas esti tre bonvena. Samtempe ĝi povas esti, en

SPIONAJ AFEROJ EN NIA TEMPO

Jen la historio pri John Eppler

John Eppler naskiĝis en Kaiserlautern en Germanio en 1914. Lia patro mortis ĉirkaŭ 1920. Kaj ĉar lia patrino ekhavis postenon ĉe hotelo en Port Said, ŝi elmigris al Egiptujo kaj kunportis la malgrandan filon.

Ŝi estis juna kaj ĉarma virino, kaj la viroj adoris ŝin. Ŝi edziniĝis al la simpata kaj bonstata advokato Saleh Gâafer. Post la geedziĝo ili sin instalas en Kairo. John estis adoptata de Gâafer, kaj de nun li nomas sin Hussein Gâafer. Li ekhavis bonan instruadon, lernis skribi kaj paroli arabe kaj frekventis anglan lernejon en Helliopolis kaj Aleksandrio, sed li neniam forgesis sian gepatran lingvon. Li elkreskis kaj fariĝis ĝentila kaj bonedukita viro, sed samtempe

akademijaj rondoj, tre taŭga argumento pri la kapablo de Esperanto kiel scienca lingvo.

JHR.

D-ro Victor Sadler: Esperanta-Sinhala vortareto. Eld. UEA. 28 paĝoj.

Turku, Finnlando. Faldprospekto en Esperanto, ilustrita. Petu ĉe Turun Kaupungin Matkailutomisto, Linnankatu 8, Turku.

Sennacieca Revuo 1967. Eld.: SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20, 56 paĝoj + kovrilo, prezo: 0,90 dolaroj. Diverstema revuo: literaturo, historio, ekonomio ktp., tre rekomendinda.

Kolekto «Zamenhof en sia tempo». 3 kajeroj: Kongresinto: Boulogne 1905, Testo kaj triumfo; A. Ribot: Aŭtografoj de D-ro L. L. Zamenhof; C. Van Kleef: La Homaranismo de D-ro L. L. Zamenhof. Eld.: Esperantaj Francaj Eldonoj, 11 rue Vergnes, Marmande, Francujo. Prezo: ĉiu libro 2 fr. 40 + afranko.

Sergej Jesenin: Versoj elektitaj. Eld.: Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaĵ esperantistoj, Moskva, 1965. 65 paĝoj. Ciklostilita.

Por la paco. Ciklostilitaj kajeroj. Eld.: Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaĵ esperantistoj, Moskva, 1966.

Kantoj de niaj patroj. Kantaro ciklostilita. Eld.: Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaĵ esperantistoj, Moskvo, 1967.

li estis tipe senskrupula kaj mallaborema. Li nur volis sin amuzi. Li diboĉis kaj forludis kapitalon en Aleksandrio kaj plene ĝuis la vivon kun dancistinoj kaj horistinoj. Ĉi tiuj konatecoj ordinare estis tre efemeraj. Tamen la interrilato al Hekmath Fathmy, dancistino de nokta klubo en Kairo, estis escepto. Ŝi komprenis ensorĉi lin tiel ke li fojon post fojo revenis al ŝi.

La 13a de aŭgusto 1938a fariĝis decidiga tago al la juna Hussein, tiam aĝa 24 jarojn. Li estis kontaktata de s-ino Paulo Koch, kiu estis la plej grava reprezentanto en Mez-Oriento de «Abwehr» — la sekreta polico de la germana armeo. Ĉiuj raportoj por «Abwehr» devis esti sendata de ŝi.

Pruviĝis, ke ŝi faris bonan elekton. La juna Eppler estis trovaĵo por «Abwehr». Li estis grandmondulo, talentplena je lingvoj, inteligenta kaj ĉarma. En 1939 li estis lokata en la Mez-Oriento, kaj tie li konis ĉion kaj ĉiujn. En la daŭro de tri jaroj li laboris kiel agento, ĝis al li en 1942 estis konfidataj la plej gravaj spionad-komisionoj de la mond-milito. «Abwehr» igis sian plej taŭgan viron kontroli la taskojn de Eppler pli detale. Oni ordonis, ke Eppler parkere lernu ĉiujn instruojn, ĝis li kapablos ilin ripeteti dorme. La duan de majo 1942a oni aertveturigis lin al la ĉefa kvartiro de generalo Rommel. Li kunportis monbiletojn kaj oron havantajn valoron de pli ol 1 miliono da kronoj.

La 12an de aŭgusto 1942a generalo Montgomery alvenis al Kairo kiel ĉefkomandanto de la 8a armeo brita.

La frontlimo streĉiĝis ekde la dezerto ĝis la Mediteraneo, preter El Alamein kaj proksimume 50 kilometrojn pluen en la valo Quattara. Ĉeestinte la fronton unu tagnokton, Montgomery metis montran fingron sur la mapo dirante: «Ĉi tie Rommel provos trapenetri.»

La fingro montris al Alam Haifa.

Rommel preparis sin por nova ofensivo en la dezerto celante atingi la riveron Nilo. Li bezonis en plej alta grado taŭgan kaj bravan spionon por laborado malantaŭ la anglaj linioj. Mankis al li informoj pri la projektoj, fortoj kaj disonoj de la interligitoj. Laŭ la projekto du viroj estis por-

total al Kairo, nome Eppler kaj lia radiotelegrafisto. Sed kiel! Urgis! La plej rapida solvo estis la plej danĝera. Hungara grafo, arkeologo kaj aventurulo, proponis sin por veturigi la du agentojn kaj ilian pakajon al Sud-Egiptujo per aŭtomobilo. — Kaj tiel okazis.

Estis penega vojaĝo en la terura varmo, sed post multaj ekscitaj aventuroj ili alvenis al Kairo. Eppler tuj serĉis kontakton kun sia malnova amikino, la dancistino Hekmath Fathmy. Ŝi tuj konsentis helpi Eppler pri lia speciala laboro, kaj ŝi fariĝis tre utila spiono por li.

Alveninte al Kairo, ili tuj irigis la sendilon kaj ondadis la saman nokton la kodajn signalojn: «Kondoro alvokas. Kondoro alvokas. Loko de destino atingita. Preta komenci.» Kaj post unu horo la respondo venis: «Sciigo ricevita. Sekvu la instrukciojn. Urgas. Sukceson kaj feliĉon.»

S-ino Hekmath proponis lupreni boaton kuŝantan sur Nilo. La luprezo estis po 100 pundoj monate, sed tio ne gravis. Ili havis sufiĉe da mono. La plej proksima najbaro estis brita majoro ligita al la ĉefa kvartiro de la brita informaj aferoj. La brita majoro estis gaja kaj sociema viro. Eppler baldaŭ komencis interparoli kun li kaj invitis lin surŝipen por trinkaĵo. Samtempe li profitis la okazon plendi, ke la radio ne estas tiel bona, kiel ĝi devas esti. Kaj tial la majoro promesis havigi al ili pli bonan antenon. Li plenumis sian promeson.

Ili akiris la plej grandan ĉambretan gramofonon haveblan kaj enfermis la sendilon en ĝin. Nun ili havis sekuran kaj konvenan lokon por la sendilo; sed ili tre bone komprenis, ke kiam ĝi ekfunkciigos, tuj fariĝos granda risko, ke la britoj ŝtelaŭskultu ĝin. Tamen Eppler fidis sian sekretan kodon. Li mem faris ĝin, kaj ĝi estis bazita sur tute difinita ĉapitro de la romano «Rebecca» de Maurier. La britoj estus senhelpaj, kiom ajn lertajn homojn ili havus por la deĉifrado.

Sed Eppler kaj lia amiko Moncaster, nomata Sandl, baldaŭ ekhavis ion alian por pripensi. Ĉar eĉ se troviĝis entute tri germanaj riceviloj, — en Ateno, en Smirno kaj en la dezerto mem —, kiuj ĉiuj senescepte aŭskultu la alvokajn signalojn de la Kondoro — ili ne plu ricevis respondon. Kial? «Abwehr» ordonis «radiosilenton». Io okazis en la dezerto. La generalo Rommel iun vesperon en junio tute senatendite venis

por viziti precize tiun elstaran interligo-grupon, kies tasko estis ricevi raportojn de la Kondoro.

La postan matenon, dum Rommel sin razis, brita taĉmento neatendite atakis la interligo-grupon. Rapide kiel fulmo, Rommel enaŭtomobiligis sin kun la tuta vizaĝo kovrita de sapŝaŭmo. La aŭtomobilo estis truata kaj uniforma epoleto forpafata, sed tamen li sukcesis sin elsavi. La germana interliga grupo kontraŭe falis en la manojn de la britoj. La britoj komprenis, ke sendilo estas en funkcio preskaŭ ĉiun vesperon en Kairo, sed ĉiuj sendaĵoj ĝis nun daŭris tiel mallonge, ke estis neeble trovi la lokon de la sendilo. John Eppler ne havis multon por sendi. Ĉar la britoj seninterrompe ŝanĝis siajn projektojn, kaj estis malfacile akiri efektive fidindajn informojn.

— Plurfoje Rommel klarigis, kion li deziras ekscii.

Sed iun nokton meze de juli okazis io. Lia amikino Hekmath sukcesis ruze akiri tekon de brita kolonelo. La teko enhavis precize tiujn paperojn, kiuj respondis al ĉiuj demandoj de Rommel. Sandy febre sendis: «Kondoro alvokas, Kondoro alvokas,» sed en la etero la granda silento regis. La postan nokton ili ricevis respondon; sed oni ordonis, ke ili revenu post 24 horoj.

Ĉi tiujn informojn ankaŭ la britoj aŭdis.

Unu el la informoj tekstis: «Plifrua informo konfirmita de nepre fidinda fonto. En la batalo pri Egiptujo la 8a armeo por ĉiu ajn prezo en la mondo malcedu ĉe Alam Haifa. Montgomery povas atendi plifortigojn plej frue post unu monato.»

Ricevinte tiun sciigon, Rommel frapis al si la genuojn kaj ekkriis ĝojege: «Prizorgu, ke Eppler ekhavu altan ordenon!»

En la dezerto oni preparis sin por la lasta decidiga batalo je ambaŭ flankoj de la militlinio. Necesis trovi la sendilon ĝustatempe. La milito povus ekfuriozi kiam ajn. Tial majoro Samson, la ĉefo de la brita informo servo, ekigis 2.000 virojn trovi la sendilon. Ĝustatempe ili sukcesis trovi ĝin. Antaŭa brita agento kapablis deĉifri la kodon kaŝitan en iu ĉapitro de «Rebecca».

La 31an de aŭgusto Rommel ekatakis kaj suferis frakasantan malvenkon — precize ĉe Alam Haifa. Kaj ĉi tiu batalo fariĝis la komenco de la fino de la Afrika aventuro de la germanoj, kie generalo Rommel havis grandan sukceson kaj rikoltis tiom da trium-

POEMOJ de Armand Su

EN LUDI-KAVERNO

Jen palaco ŝtona de diabloj
— la plej bela en la mondaj fabloj.
Ju pli palpe mi internen paŝas.
des pli da mistero mi malkaŝas.
L'altaj stalaktitoj lante gutas
kaj l'praŝtonoj en embusko mutas.
Sen viv-ehoj kaj sen homa voko.
Ĉu revenas mi al praepoko?

(Gujlin, aprilo 1967)

SUR LA MARPLAĜO

Sur varmaj sabloj de l'marplaĝo
manplekte ambaŭ ni kunkuŝas.
Ĝojigas nin la sun' kaj naĝo,
kaj ŝia dolĉa spir' min tuŝas.

Volviĝas ŝia nuda belo,

kaj ene l'virga koro flamas.

Inter la mar' kaj la ĉielo,

al ĉi mi flustras: Vin mi amas!

(Kunming, junio, 1967)



Armand Su
en Ludi-Kaverno.

IOM DA KRITIKO

Ni ricevis de s-ro Antoniĵe Sekelj, Beograd, iom longan leteron kun la titolo, kiun vi vidas super ĉi tiuj linioj. Li komencas la leteron tiel ĉi:

«Eble pro tio ĉar mi respondecis pri la lingva korekteco de iu revuo, redaktis alian kaj nun redaktas trian revuon — ofte legante artikolojn en Esperantaj revuoj, min tiel ĝenas lingvaj eraroj, ke mia tuta atento koncentriĝas al ili, kaj la enhavo preskaŭ ĉesas interesi min. Ŝokis min tri eraroj en la artikolo de eminenta esperantisto, des pli, ĉar ili aperis en artikolo traktanta lingvan problemon. Temas pri la artikolo LINGVO KAJ IMITADO de JHR (mi supozas: Johan Hammond Rosbach) en n-ro 2/68 de Norvega Esperantisto.»

Unue li atakas frazon en la dua alineo («la lingvon, kiun ni verŝajne parolas pli bone ol la lernitaj kaj studitaj naciaj lingvoj») kaj gramatike analizas la frazon. Ni ne redonas lian analizon, ĉar la eraro — la mankanta akuzativo — estas sufiĉe elementa, kaj ni povas nur bedaŭri kaj honti.

Due li mencias — denove prave — la eraron, ke la verbo *fini* estas uzita intransitive anstataŭ *finigi*. Denove elementa eraro, kaj ni ne trovas senkulpigon.

Trie kaj fine li substrekas la diferencon inter la verboj *reprezenti* kaj *prezenti*. La eraron certe kaŭzis la fakto, ke la aŭtoro

foj kelkan tempon, sed kie li trovis ankaŭ sian Vaterlo-on.

Laŭ tio, kion oni scias, Rommel neniam ekkomprenis, ke li estis allogata en insidon ĉe Alam Haifa. La sciigo nome ne venis de la germana spiono, sed de la britoj.

Oni sekretigis la areston de Eppler kaj Sandy, kaj jen la britoj prenis sur sin la sendaĵon de Kairo kaj donis tiujn informojn, kiuj allogis Rommel en la insidon, kiu kaŭzis lian malvenkon.

La du spionoj germanaj estis ambaŭ mortkondamnataj. Sed ili estis pardonataj kaj vivas ankoraŭ kaj bonfartas.

Laŭ artikolo en
Stavanger Aftenblad.
Esperantigita de
Rudolf Dreyer.

UNESKO- novaĵoj

STATISTIKOJ DE U.N.

Inter 1960 kaj 1965 la monda loĝantaro kreskis de 3 005 milionoj ĝis 3 295 milionoj. La jara kresko estis plej malgranda en Eŭropo: 0,9 %, poste (iom mirige) en Orienta Azio (1,4 %), poste en Norda Ameriko kaj Soveta Unio (ambaŭ 1,5 %). La plej rapida kresko montriĝis en Suda Ameriko (2,8 %), Suda Azio (2,5 %) kaj Afriko (2,3 %).

En la Statistika Jarlibro de U.N., kie aperis tiuj ciferoj, troviĝas ankaŭ statistikoj pri ekonomio, socio, kulturo kaj klerigo dum la pasintaj 9 jaroj.

KONSTANTA JUNULARA CENTRO POR EŬROPO

La Konsilo de Eŭropo decidis konstrui en Strasburgo konstantan Eŭropan Junularan Centron. La Centro povos akcepti ĉ. 560 partoprenantojn jare kaj verŝajne estos preta okaze de la 20-a datreveno de la Konsilo en 1969.

ĉiutage parolas fremdan nacian lingvon, en kiu la koresponda verbo havas la prefikson *re-*, kio tamen nenial senkulpigas lin.

La letero de s-ro Sekelj efektive forte substrekas la enhavon de la artikolo: ni imitadu bonajn aŭtorojn, ni legu literaturon, ni parkeru vortojn, ni ekuzu bonajn parolturnojn, ni lernu tutajn frazojn.

Sub sia artikolo aŭ letero s-ro Sekelj aldonas jenon: «P.S. Se mi jam kritikis, permesu rimarkon ke en la sama revuo sur p. 30 estas multaj preseraroj en la nomoj de jugoslavaj lokoj. Devas esti ne Porec, sed Poreč, ne Primosten, sed Primošten, ne Jabljak, sed Jabljak, ne Zagreb, sed Zagreb, ne Jugoszlavio, sed Jugoslavio.»

Ni bedaŭras la multajn preserarojn. Sed s-ro Sekelj devus iam vidi, kiel estas skribitaj la nomoj de norvegaj lokoj, ekz. Trondheim kaj Sarpsborg, en leteroj kaj presaĵoj el aliaj landoj (kio kompreneble ne senkulpigas nin)!

JHR.

INTERNACIA KOMPRENO EN HIMALAJO

Unesko subvencias per mono kaj teknika helpo seminarion pri edukado por internacia kompreno, kiu okazas en la unua parto de 1968 en Katmandu, Nepalujo, sub komuna aŭspicio de la Nepala Registaro kaj Unesko.

SINGAPURO: KVAR OFICIALAJ LINGVOJ

La Respubliko Singapuro, kiu troviĝas ĉe la plej suda pinto de la Malaja Duoninsulo, konsistas el unu pli granda kaj pluraj malgrandaj insuloj kun entuta areo de 224 kv. mejloj (580 kv. km.). Ĝiaj 1 800 000 loĝantoj formas socion multlingvan kaj diverskulturan, en kiu ĉinoj, malajoj kaj hindoj estas la ĉefaj etnaj grupoj.

En 1957 oni taksis la analfabetecon inter la loĝantoj pli-ol-naŭjaraj je 55 %, sed la sesjara elementa instruado senpaga enkondukita en 1960 en la lernejoj, kies instrulingvo estas unu el la kvar oficialaj (malaja, ĉina, tamila aŭ angla), nun jam elradikigas la analfabetecon.

Sed en tia nova, diverslingva nacio, kie ia sento de nacia ununeco estas tre grava elemento, ĉiam pli sentigata la bezono de la komuna rimedo de interkompreniĝo. Tial la ministeria instanco «Lembaga Gerakan Pelajaran Dewasa» (Komitato por Klerigo de Plenaĝuloj) insistas pri instruado de dua kaj eĉ tria lingvo por faciligi la intergrupajn kontaktojn. De post 1960 ĝi do organizas kursojn de ĉiaj temoj kaj ĉiaj niveloj en la kvar oficialaj lingvoj kaj samtempe instruas la lingvojn germanan, francan, japanan, tajan, hindian, hispanan, italan, rusan kaj aliajn. En 1966 pli ol 54 000 personoj partoprenis lingvo-kursojn en 1 795 klasoj.

(Laŭ Unesco Features kaj Informa Servo de UEA.)

KVIN VIRINOJ DE AMORO

Kvin japanaj noveloj
de Ihara Saikaku
Bindita kr. 32,—

Aldonu 10% por sendkosto

Eldonejo Esperanto,
Boks 942, Oslo 1



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA
FERVOJISTA ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek, Kaldbakkstribben 22,
Oslo 9

LA JARKUNVENO DE NEFA 1968

Dimanĉe la 18an de februaro okazis la jarkunveno de NEFA en hotelo Carlton en Lillestrøm.

Inter la ĉeestantoj, la prezidanto ankaŭ havis la ĝojon speciale bonvenigi la honoran membron Magnus Carlsen, kaj la prezidanton de NEL, s-ro C. Støp-Bowitz.

Estas kutimo kaj tradicio ke venas gastoj de la najbarlandaj IFEF-sekcioj, Ĉijare neniu venis, sed la prezidanto laŭtlegis salutleterojn kaj de la sveda kaj de la dana sekcioj.

La sekretario referis la protokolon, kaj poste la prezidanto informis pri la agado dum la lasta jaro.

La nombro da membroj estas konstanta, ĉ. 60.

Daŭre ni ĝojas pro la bonaj rilatoj inter la fervojista esperantomovado kaj la fervoj-administracio, kaj la sindikato.

Ambaŭ instancoj subtenas la movadon ekonomie, morale kaj praktike. En la fakrevuo de NSB, «Vårt Yrke», la 19a kongreso de IFEF en Fulda menciigis, kaj la faka gazeto, sindikata: «Jernbanemanden», grandskale referis la menciitan kongreson.

Cetere oni relative ofte en la sindikata gazeto povas legi artikolojn tradukitajn al norvega, de la IFEF-organo: «La Internacia Fervojo». Jen ni resumas la plej gravajn okazintaĵojn dum la jaro.

Aliĝo al FISAIC de la tuta norvega fervojistaro.

NEFA eldonas «Fervoja Paĝo» en la presorgano de NEL.

La 19a kongreso de IFEF en Fulda, bonega demonstracio pri la utileco de Esperanto en internacia trafiko.

Post tiu kongreso vizitis nin nia amiko trajnĉefo Hans Hunkeler kun estimata edzino.

Ili faris rondvojaĝon en okcidenta Norvegujo, cetere li prelegis pri la svisa tra-

fikmuzeo en Luzern, kaj montris diapozitivajn pri ĝi en la Fervojmuzeo en Hamar, kaj Per Johan Krogstie interpretis al la ĉeestantaj neesperantistoj.

Okazis solena inaŭguro de la bonega feriohotelo por fervojistoj: Rapham en Gudbrandsdalen, kie inter multaj, ankaŭ la NEFA-prezidanto estis.

Lau instigo de kolego Giessner, germana komitatano de IFER, ni serĉis kontakton kun grupo da radioamatoroj, por montri al ili la taŭgecon de Esperanto.

Ni sukcesis varbi NSB kiel tutpaĝan anoncanton en la jarlibro de UEA, sekve alvenas multaj poŝtaĵoj al la preskontoro de NSB, kun petoj pri alsendado de informajoj en la internacia lingvo.

Estas tasko por NEFA traduki tiujn leterojn.

La raporto de la kasisto montras ke la ekonomia situacio estas bona. Tial la jarkunveno decidis aĉeti akciojn en Eldonejo Esperanto A/S.

Starigis fonduso por helpo al IFEF-anoj en nepagipovaj landoj por ke ili povu pagi kongres-kaj membrotizojn al IFEF.

La jarkunveno deziras ke la estraro de IFEF decidu kiu ricevu rimedojn el la fonduso.

Esperantistaj fervojistoj en Ĉeĥoslovakio tre interesas sin pri Norvegio (eĉ pri ceteraj skandinaviaj landoj) kaj ŝatus korespondi pri diversaj temoj kun nordlandaj gesamideanoj. Ni respondas ĉiun leteron aŭ bildkarton kaj sendos prospektojn pri naturbelaĵoj de Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Rondo de ministerio por trafiko/s-ano Bohumil Král/ Praha 1, Příkopy 33.

LA REVO KIU REALIGIS

De Magnus Carlsen.

Hodiaŭ estas mirinde memore konsideri la grandan socialan evoluon kiu okazis en nia lando depost la jaro 1916 ĝis nun.

En 1916 mi estis 18 jara junulo kaj funkciulo ĉe seĝejo.

Kolego, 10 jarojn pli aĝa ol mi, kaj mi estis ordonataj de nia ĉefo vojaĝi al malgranda fervojstacio en la orienta parto de nia lando por akcepti aron da segitaj lignaj tabuletoj.

Mia kolego mezuris kaj klasifikis la tabuletojn laŭ kvalito, kaj per klara voĉo li indikis ilin unu post alia al mi. Mia tasko estis enlibrigi kaj la mezurojn kaj la klasifikojn.

Ĉe la staciono ne troviĝis loĝ- kaj manĝejo. Tial ni enloĝiĝis kaj manĝis ĉe farmisto, kiu posedis grandan bienon. Mi rimarkis, ke ĉe la farmisto loĝas multaj tre maljunaj viroj, entute 11, kaj ĉiuj estis ĉirkaŭ 80-jaraj — kelkaj iom pli kaj aliaj iom malpli aĝaj ol 80. Mi ankaŭ rimarkis, ke ili ĉiutage laboras sur la grandaj kampaj parceloj de la frua mateno ĝis la malfrua vespero.

Iun tagon mi demandis unu el la maljunuloj: «Ĉu vi ĉiutage estas devigataj labori sur la kampaj parceloj de la mateno ĝis la vespero?» Al tio li respondis: «Jes, escepte nur, se ni estas tiom malsanaj, ke la malsano devigas nin enlitiĝi.» Pro kunsento al tiuj maljunaj kompatinduloj mi sentis pikon en mia juna koro.

Ni estis plenumintaj nian komision kaj vojaĝantaj hejmen per la trajno. Mia kolego legis sian gazeton, kaj mi rigardadis tra la kupea fenestro la regionon, kiun ni trapasis. La impresado de la malfeliĉaj maljunuloj ĉe la farmisto forte kaj daŭre okupis miajn pensojn. Fine mi ellasis jenan rimarkon al mia kolego: «Mi sidas pensante pri la malfeliĉa sorto de la maljunuloj ĉe la farmisto.

La estraro reelektiĝis, kaj ni citas la plej gravajn funkciojn. Per Johan Krogstie, prezidanto. John Moe, vicprezidanto. Odd Kolbrek, sekretario kaj redaktoro. Kjell O. Karlson, kasisto. Kiel reprezentantoj al la 20a kongreso de IFEF en Varna en Bulgario elektiĝis Per Johan Krogstie kaj trajnĉefo Kåre Bye, Hamar.

Per Johan Krogstie.

Unue ili dum sia longa vivo penis kaj laboris por siaj laboronantoj ĝis alta aĝo; sed kiam ili ne plu povas havigi kontenige multon da profito al sia laboronanto, ili estas maldungataj kaj forpelataj. Post tio la komunumo sendas ilin al farmisto, kie ili estas devigataj labori, ĝis ili estas pretaj por sia lasta ripozejo — la tombo. Ŝajnas al mi, ke ili ne meritas tian sorton; ili meritas, ke oni konstruu specialajn domojn por ili.» Mia kolego respondis jen: «Jes, vi pravas; sed kiel vi komprenas: la komunumoj ne havas sufiĉe da mono por konstrui tiajn domojn.»

Sed, kio okazis dum la pasintaj 50 jaroj depost 1916? Ja, hodiaŭ niaj maljunuloj enloĝiĝas en grandaj modernaj domoj, kie troviĝas ĉia ajn komforto por la maljunaj homoj. Tie ili ĝuas sian maljunaĝon en trankvilo kaj komforto.

LA MALFRUIĜON

De ĉi tiu numero kaŭzis rearanĝo de la maŝinaro en la Presejo.

VI bezonas UEA

En via intereso, Universala Esperanto-Asocio **KOMPETENTE** reprezentas la interesojn de la Internacia Lingvo ĉe internaciaj instancoj; pere de CED *prizorgas* dokumentadon pri ĉiuj aspektoj de la lingva problemo; *organizas* la mondan informadon pri la Internacia Lingvo kaj *disvastigas* la lingvon en ĉiuj mondopartoj; *aranĝas* altnivelajn kongresojn, konferencojn kaj seminariojn; *kuraĝigas* la artan kreadon kaj evoluigon de la lingvo per Belartaj Konkursoj, Artaj Festivaloj, Internacia Somera Universitato, serio Oriento-Okcidento; *eldonas* tri revuojn, ampleksan Jarlibron kun amaso da fidindaj informoj kaj aliajn publikaĵojn; *prezentas* la maksimumon de ĉiaspecaj praktikaj servoj, precipe pere de la delegita reto, unika en la mondo . . .

UEA BEZONAS VIN por povi pli sukcese plenumi siajn taskojn kaj por doni al vi ankoraŭ pli da praktikaj servoj.

ALIGU JAM HODIAŬ INDIVIDUA MEMBRO DE UEA. Kotizoj sur paĝo 35.

LA INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ EN HELSINGØR

La feriaj kursoj fondiĝis jam en 1932 en Silkeborg, sed en 1936 la aranĝo translokiĝis al La Internacia Altlernejo en Helsingør, ĉar pro la granda kresko de la nombro de la partoprenantoj la spaco en Silkeborg fariĝis tro malgranda. En Helsingør la kursoj funkcias seninterrompe ĝis hodiaŭ kaj sub la sama gvidanto.

Kaj unu el la sekretoj de la multjara sukceso, li diras, estas ke la partoprenantoj ne devas labori dum la *tuta* tago, sed nur antaŭtagmeze, tiel ke la cetera parto de la tago estas la internacia kunvivado dum promenoj, ekskursoj kaj bonhumoraj vesperaj aranĝoj. Oni devas senti, ke oni vere ferias en sia feriotempo.

Senpagaj prospektoj estas haveblaj, se oni skribas al s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Danlando.

FUNDAMENTAJ «HOMAJ RAJTOJ» KAJ LIBERECO

(Internacia labortago en Sonnenberg/ Germanujo de 29. 9. — 29. 9. 1968.)

Per tia internacia semajno, al kiu ni intencas inviti reprezentantojn de la registaroj landaj, ktp., ni esperas grandan paŝon antaŭen. Sonnenberg estis fondita post la lasta milito kiel renkontejo de geinstruistoj el la tuta mondo. La Internacia Laborrondo Sonnenberg estas societo por akceli internacian kunlaboron kaj laboras sub la moto: «Paroli unu kun la alia — antaŭjuĝojn venki — interkompreniĝi — respondece agi.»

Tial ni vokas la instruistojn de la mondo: Partoprenu, rezervu jam nun la tempon en septembro por Sonnenberg kaj anoncu vin baldaŭ!

La kadrotemo de la kunveno estos: *Fundamentaj «Homaj Rajtoj» kaj liberecoj*. Prof. Lapenna kaj diversaj aliaj eminentaj esperantistoj prelegos. La restado en la komforta hejmo Sonnenberg peras krom la interesa tagordo ankaŭ interparoladojn kaj sufiĉe da libera tempo por promenadoj en la ĉarma ĉirkaŭaĵo, en la famkonata Harzmontaro. La kotizoj ne estas altaj, ili sumiĝos nur je 80,— gmk por dek tagoj (manĝadoj kaj tranoktiĝoj inkluzive).

Anoncu vin ĉe la EUGI-komisiito por la Sonnenberg aranĝo Helmut Sonnabend, rektoro 3161 *Dollbergen*, über Lehrte Germanujo.

INTERNACIA FERIOSEMAJNO EN SALZBURG

de 8.—16. Junio 1968 en la naturamikaĉdomo Monchsberg.

Programo: Rigardo de la urbo kaj ties vidindaĵoj. Ekskursoj al la belega ĉirkaŭaĵo de Salzburg. Vesperaj aranĝoj, paroladoj, diskutoj, lumbild kaj filmprezentadoj. Partopreno al la Aŭstria Esperantista Konferenco en Salzburg de 13.—16. VI. 1968. Sabate la 15. VI. antaŭtagmeze fakkunsido de la naturamikaj Esperantistoj.

Kotizo: Noktiĝo en tri kaj kvarlitaj ĉambroj kun matenmanĝo, gvidadoj, kaj partopreno al la konferencaj aranĝoj — aŭstriaĵ ŝilingoj — 450,— La aliĝo estas traktata post antaŭpago de \$—200,—.

Esperantoprospekton pri la urbo Salzburg vi povas ricevi post alsendo de unu respondekuponon. Pagojn direktu al M. Finkensteller, Stieberg. 6/ A-1150 Vieno, Creditanstalt-Bankverein K. Nr. 68-20021 Sechshauserguertel.

TRIA KONGRESO de la STUDENTA TUTMONDA ESPERANTISTA LIGO AIX-en-Provence-FRANCUJO

13—20 aŭgusto 1968

Programo: Kiel kutime: interkona vespero, oficiala inaŭguro, komitatkunsidoj, distra vespero, balo, ktp. . . kaj ja oratora konkurso!

Loĝado: en modernaj unupersonaj ĉambroj de la studenta hejmo. Proksime de la studenta hejmo troviĝas la studenta restoracio, kie ni plej ofte manĝos, kaj la Belettra Fakultato, kie okazos la kongreso.

Aliĝo: ĉe Studenta Esperantista Rondo, 28 rue Portalis, 13-Aix-en-Provence Bonvolu indiki viajn nomon, antaŭnomojn, naskiĝdaton, studobjekton (tre precize: jaro, fakultato, fako, ktp.) adreson; bonvolu skribi ĉu vi estas membro de STELO aŭ ne, kaj kiamaniere, vi pagas la kongreskotizon (poŝtĉekkonto, — internacia-mandato). Aliĝo validas nur post ricevo de la pago.

Prezo (manĝadoj, loĝado, kongresaj programoj kaj ekskursoj): ĝis la 31-a de marto: nur 130 F (375 steloj) por membroj de STELO 140 F por ne-membroj (400 steloj)

pĉk: Cercle des Etudiants Esperantistes, 4 721 42 Marseille.

ul. 3, Mikulov na Mor, ĈSSR — Ĉeĥoslovakujo.

MADRID

Madrid estas unu el la plej kompleksaj eŭropaj urboj. De ĝiaj plej kosmopolitaj stratoj kun luksaj hoteloj, rafinitaj kafejoj, elegantaj vendejoj kaj spektaklaj salonoj, ni pasas ofte al mallarĝaj stratoj, silentaj placetoj — nostalgiaj, romantikaj anguloj de iu Madrid intima kaj kvazaŭ provinca — malnovaj velkigintaj palacoj kaj ŝtonoj, kiuj ŝajnas paroli pri la jaroj de la aŭstra aŭ borbona dinastioj.

Tamen, tiu malnova Madrid, kompare kun la moderna Madrid brilanta samtempe la mil pupilojn de siaj lumaj anoncoj, ne estas iu Madrid danĝera kaj perversa, sed Madrid afabla kaj ridetanta, duonsinjoreca kaj duonlaborista, kun nigraj okuloj post ĉiu balkono garnita de buntaj florpotoj, en stratetoj kie ankoraŭ ekzistas gaslanternoj, kaj kie vi povas ankoraŭ aŭskulti la gajajn notojn de malnovaj gurdoj.

Madrid ne estas monumenta urbo, certe. Ĝi ne estas plena de Historio, kiel estas aliaj urboj en Hispanujo.

Tamen, Madrid posedas iun strangan kaj magian altiron. Ĝi baldaŭ penetras en la koron de la vizitantoj. Ĉu la kaŭzo estas eble la mirinda kaj pura lumo de la urbo? Ĉu la ĝentileco de la madridanoj? Ĉu la beleco kaj ĉarmo de la madridaninoj? La grandaj, belegaj parkoj kaj promenejoj, la larĝaj, sinjorecaj stratoj kaj avenuoj, la intimeco de malnovaj kvartaloj aŭ senfina arta riĉeco de ĝiaj Muzeoj kaj palacoj? Aŭ estas, tute simple, la mirinda kombinaĵo de tiuj mil diversaj elementoj, kiu faras el Madrid unu el la plej belaj urboj de la mondo?

Kiu scias . . . ! Tamen, venu kaj vidu!

Korespondu!

Kuracistino, 27 jara, serĉas geamikojn en la tuta mondo. Dr. Marie Havlová, Kamenacký 3 a, Brno 15, ĈSSR — Ĉeĥoslovakujo.

Mezaĝa instruistino serĉas geamikojn en la nordo de Eŭropo. E. Havlova, ZDS Valticka

Ni deziras korespondi kun norvegaj geamikoj pri ĉiuj temoj. Lubarda Slobodan, *Ljubljana*, Bernekerjeva 36, Jugoslavio.

Dez. kor. Esperante, angle, germane, ruse, kolektas poŝtmarkojn, librojn, kantojn, ilustritajn kartojn. D-ro Kuztos Dénes, emerita profesoro, Úttőroház, *Budapest XIV*, Május 1.u. 3., Hungarujo.

18-jara studento pri ekonomio (eksterlanda Komerco) dez. kor. pri politikaj opinioj, scienfantazia literaturo, interŝ. pm. Ivo Zelezhy, Vrchického 41/493. — Koširé, *Praba 5*, Ĉeĥoslovakio.

40-jara virino, eksedzino, intereso: vojaĝoj, bildkartoj, modorevuoj dez. kor. kun serioza fraŭlo aŭ vidvo ne pli ol 50-jara. Bv. aldoni foton. S-ino Sofia Rosinska, Str. Mynonska 29/6, *Warszawa 42*, Polujo.

20-jara studentino dez. kor. kaj interŝ. bildkartojn. F-ino Jarmila Musilová, ul. Jiriho z Podébrad 69, *Šumperu*, Ĉeĥoslovakio.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadresse: Boks 942, Oslo, Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, 1700 Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo.